ISSN: 0291-6037

# la informilo

***

## informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

**eldonisto:**

**ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO**

*Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto*
*Maison des Jeunes et de la Culture*

*27, rue de la République, 54000 NANCY F*

*PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY*

**nouvelle série**
**trimestriel**
**2ème trimestre 1983**
**n° 42**



**abonnement**
**un an: 18 F**
**UNU JARO: 18 F**
**(8 INTERN. KUPON.)**

**ANTO-FLASH... ESPERANTO-FLASH... ESPERANTO**




## L'espéranto au carnaval de BAR-le-DUC

Comment assurer de façon originale la promotion de l'espéranto? Ce problème a été résolu de magistrale façon par la Section Française de TEJO (Jeunes espérantophones mondiaux) et le club local. Près de 50 participants dont un groupe important venu de R.F.A. ont apporté une note exotique à la grande manifestation populaire du 20 mars. fabrication de masques et de costumes, veillée internationale, bal masqué et grand défilé dans les rues de la ville ont constitué les points forts de cette rencontre. La grande sphère colorée de près de 4 mètres de hauteur a été particulièrement remarquée. Près de 2000 documents informatifs ont été distribués à la foule.
Dans le cadre d'un reportage télévisé sur le carnaval, diffusé en septembre prochain, une séquence importante sera réservée à cette prestation internationale.

**inscrivez-vous à notre 17ème stage!** (25 ET 26 JUIN)

TOUS RENSEIGNEMENTS ET BULLETIN INCLUS DANS CE NUMERO

## GRAND WEEK-END CULTUREL A LUXEMBOURG ★

Invitée par l'Association Espérantiste Luxembourgeoise, la Fédération Culturelle France-Est pour l'Espéranto a tenu son 42ème congrès dans la capitale du Grand-Duché, les 23 et 24 avril, à la Maison de l'Europe. Dès le vendredi un diaporama commenté en espéranto a montré les aspects les plus caractéristiques des environs. Au programme de la journée du samedi: visite du vieux Luxembourg, assemblée générale de la Fédération, buffet et soirée internationale au cours de laquelle les congressistes ont pu apprécier chants et poèmes en espéranto.
La matinée du dimanche était consacrée à la mise en place de la nouvelle campagne de sensibilisation proposée par l'Association nationale et au renouvellement du Comité. Une visite des casemates le dimanche après-midi a suivi le banquet traditionnel. Le congrès de 1984 aura lieu dans les Vosges.

## ★ L'ESPERANTO ET LES "GENS DU RAIL"

*Les "cheminots" ignorent par nécessité professionnelle l'existence des frontières. Les associations espérantistes du personnel des Chemins de Fer ont donc connu à l'origine un développement rapide. De nombreux pays possèdent une section très active. C'est ainsi que l'Association Allemande qui tenait congrès à Friedberg (Hesse) a vu ses assises visitées par des représentants de 10 nations. Parallèlement 600 personnes ont pu s'informer sur l'espéranto grâce à l'exposition ouverte pendant le congrès. La grande réunion internationale de 1984 se tiendra quant à elle à Ostende (Belgique) du 4 au 10 juin, au Palais des Fêtes et de la Culture.*

## LE 17ÈME STAGE "D'ESPERANTO PARLÉ" ★

Organisé sous l'égide de la Fédération France-Est pour l'espéranto, il se tiendra à METZ (57), les 25 et 26 juin 1983. Rappelons que ce stage à 5 niveaux permet de commencer l'étude de la Langue Internationale ou de perfectionner des connaissances déjà acquises. La participation d'espérantophones des pays voisins lui conférera un caractère international très apprécié des Français, ce qui explique le succès habituel de ces manifestations culturelles.
Tous renseignements et inscriptions auprès du "Club d'Espéranto de Metz", MJC, 36 rue St-Marcel, 57000 METZ.

## ★ ARTICLES MEDICAUX EN ESPERANTO

*L'Association Universelle de Médecins espérantophones se montre très active depuis sa création. En dehors de son magazine officiel "REVUE MEDICALE INTERNATIONALE", des articles exhaustifs sur des thèmes précis paraissent dans divers organes de presse espérantiste. C'est ainsi que dans un des derniers numéros de HEROLDO DE ESPERANTO (bimensuel) quatre médecins japonais, polonais et américain, traitent respectivement des thèmes suivants:* "La prévention de la sénilité précoce", "Les causes déterminantes du sexe", "Les perspectives de la musico-thérapie" et "La révolution en psychiatrie"

## LA PREMIÈRE RUE "ESPERANTO" EN AUSTRALIE ★

Il devient difficile de recenser tous les squares, rues, places, monuments, plaques commémoratives dédiés à Zamenhof ou à l'espéranto et ce, dans tous les pays du monde. L'Australie à son tour vient d'inaugurer son premier "Esperanto-way" dans le faubourg de PERTH. La cérémonie s'est déroulée en présence du premier magistrat municipal, du député local et de nombreux représentants du Ministère de l'Education.

## ROMANS (26) A ACCUEILLI LE 75ÈME CONGRÈS NATIONAL DE L'U.F.E.

Minutieusement mis au point par l'équipe de "Bona Stelo", en collaboration avec l'U.F.E., ce Congrès a réuni du 1er au 5 avril près de 150 militants dans la cité de la Drôme... où s'étaient déjà tenues les assises du Congrès National en 1938! Précédé d'une exposition sur la Langue Internationale, bénéficiant dès l'ouverture de la présence effective de représentants de la Municipalité, de l'Education Nationale, d'Associations Culturelles locales, ce Congrès fut en fait une longue séance de travail fructueux où s'est élaborée la nouvelle statégie du mouvement espérantiste Français pour l'année à venir. Dans le cadre de "l'année de la communication", le Président TEXIER et la secrétaire Nationale Renée TRIOLLE, tous deux reconduits dans leurs fonctions, ont présenté la nouvelle campagne de sensibilisation dont le schéma technique et la mise au point ont fait l'objet d'une étude et de débats approfondis. Le premier magistrat de Romans, accueillant les congressistes à l'Hôtel-de-Ville, a souligné les efforts permanents des prosélytes de l'espéranto:...*"Notre regard doit être à l'échelle du monde...seule la foi permettra de vaincre les obstacles... mille fois bravo, continuez votre combat!"*
On pourra lire par ailleurs dans nos colonnes le texte de la motion de congrès adopté à l'unanimité. Il convient bien sûr de mentionner les moments traditionnels de détente, la grande soirée culturelle avec la participation fort appréciée du groupe de choristes "LA HARPE", le banquet et le bal... et les excursions très suivies malgré un temps maussade.
C'est la ville de BOURGES qui a donné rendez-vous aux congressistes pour les Assises Nationales de 1984.

## L'ESPERANTO EN ROUMANIE ET EN TURQUIE

*Une exposition intitulée "Le livre espéranto" a été programmée durant une semaine dans le hall de la Bibliothèque Centrale de BUCAREST, sous les auspices du Comité de cette bibliothèque et de la Maison de la Culture du 3ème secteur de la ville. On note par ailleurs un regain d'intérêt en Turquie pour la Langue Internationale. Dans le cadre des manifestations organisées à l'occasion du prochain centenaire de l'espéranto, l'Association Turque a décidé, en collaboration avec l'agence "MATURTURIZM" de programmer 50 séjours d'une semaine à Istanboul et à Bursa en 1983, un concours international de gastronomie en juin, neuf excursions d'un mois vers l'Iran, le Pakistan et l'Inde, 25 séjours touristiques d'une semaine dans le pays et dans l'île de Chypre.*

## L'ESPERANTO EN CHINE

La télévision chinoise à son tour apporte son soutien aux efforts entrepris dans le pays pour diffuser à grande échelle l'enseignement et la pratique de la Langue Internationale. Après parution d'un article exhaustif dans le journal "Guangming Ribao" ("Lumière"), tout un programme télévisé a été consacré à une présentation complète du phénomène espéranto. L'Ecole d'apprentissage de l'Espéranto par Correspondance de Huainan dispense pour sa part 3 cours de niveaux différents. Environ 20 000 élèves ont reçu leur diplôme en un peu plus d'un an.

## UNE NOUVELLE SECTION DE RADIO-AMATEURS ESPERANTOPHONES

*C'est en effet en Hongrie que vient d'être créée une nouvelle section au sein de l'Association Nationale. Cette initiative revêt d'autant plus d'importance qu'elle permettra sans doute d'organiser, comme chaque année dans le cadre du CONGRES UNIVERSEL d'ESPERANTO, lequel se déroulera dans la capitale hongroise en 1983, une station émettrice provisoire dont les prouesses techniques ponctuelles suscitent l'étonnement des spécialistes.*

## UNE CARAVANE CYCLISTE VERS LA HONGRIE

Antenne récemment créée au sein de l'Organisation Mondiale de la Jeunesse Espérantophone, la section cyclotourisme organise son prochain circuit à travers l'Europe. Le départ aura lieu à PASSAU (R.F.A.), le 13 juillet, destination DEBRECEN (Hongrie) pour le 39ème Congrès de l'organisation, puis Budapest. Tous les espérantistes intéressés peuvent s'adresser à T. BORMANN, Koppel 94, D-2000 HAMBURG 1.

## RENCONTRE INTERNATIONALE D'ORCHESTRES FOLKLORIQUES

Après une année d'interruption le musée ethnographique de TORUN en Pologne, en collaboration avec l'Association polonaise Espérantiste et le Conseil municipal organise la 3ème rencontre internationale de groupes musicaux à caractère folklorique, la langue utilisée étant l'espéranto. Les organisateurs prennent en charge les frais de séjour des participants. Peuvent prendre part à la manifestation les groupes de 2 à 6 personnes, avec danseurs ou chanteurs, présentant une musique populaire régionale avec utilisation d'instruments traditionnels.

## UNE NOUVELLE REVUE CULTURELLE MONDIALE EN ESPERANTO

Suite logique à la fondation d'une section de Philosophes Espérantophones au cours du Congrès d'Anvers en 1982, la revue "Simpozio" vient de voir le jour au Brésil. Trois rédacteurs principaux résidant au Brésil, en Ecosse et en France ont assuré l'édition de ce premier n° de 42 pages au contenu éclectique et original. Cette parution contribue incontestablement à conforter la valeur culturelle de l'espéranto que certains rares contempteurs voudraient minimiser. Tous renseignements sur cette nouvelle section et sur la revue auprès de M. DE ZILAH, 39, rue J.Hénot, 57070 METZ.

## EXAMENS D'ESPERANTO: VERS UNE REGLEMENTATION INTERNATIONALE

*Il n'existait pas jusqu'à ce jour des batteries d'épreuves communes pour les candidats aux examens d'espéranto. L'introduction de l'enseignement officiel de la langue internationale dans les programmes de certains pays ayant pour corollaire la formation d'instructeurs spécialisés d'une part, et la valeur reconnue sur le marché du travail de la possession de l'espéranto d'autre part, ont incité l'Association Universelle d'Espéranto à élaborer de nouvelles règles d'obtention des diplômes. Deux examens de niveaux différents seront ainsi organisés lors du Congrès Universel de Budapest. Un premier essai avait d'ailleurs été tenté avec succès lors du Congrès d'Anvers en 1982, sous l'égide de l'Institut Allemand d'Espéranto: 13 candidats de nationalité différente avaient reçu leur diplôme lors de la cérémonie officielle de clôture. Les candidats éventuels aux épreuves du Congrès de Budapest doivent s'adresser au secrétaire de la commission internatonale d'examens:* S-r° DOUGLAS F. COATES, 9 Chequerfield Avenue, Fortefract, West Yorkshire WF82TB, Grande-Bretagne.

## L'ESPERANTO EN AFRIQUE NOIRE

*A l'instar d'un certain nombre d'Universités dans le monde, l'Université d'ABIDJAN (Côte-d'Ivoire) a inséré dans son programme d'études la possibilité pour les étudiants volontaires, d'entreprendre l'étude de l'espéranto. Le caractère officiel de cette décision est cautionné par une circulaire rectorale en date du 15 janvier 1983.*

*************

# 17ª staĝo de parolata esperanto
## "Ermitage" MOULINS lès METZ

*(Rue du Château, 6 km okcidente de la Centro)*

*Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aù lernantoj en orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aù vilaĝo, kaj ofte lernantaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en Esperanto. La franclingvaj gramatikaj klarigoj estas minimumaj en la kurso A1 kajA2, preskaù ne ekzistas en la kurso B. En la kurso D ni ekstudas la literaturon de Esperanto.*

*Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktiki la internacian lingvon.*

Estas antaùviditaj 5 kurs-gradoj:

KURSO A1 — por tuj komencontoj

KURSO A2 — por ĵus komencintoj, kiuj atingis proksimume la duonon de la unua-grada kurso aù kiuj partoprenis la antaùan staĝon

KURSO B — por tiuj, kiuj finlernis unua-gradan kurson: ili havos la eblecon babili inter si helpe de "ASTERIKS LA GAULO"

KURSO C — la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon ("krokodilado" malpermesata!) Verko studota: "La Normandaj Rakontoj" (Maupassant)

KURSO D — trastudo de la verko "Maŝinmondo" (Szathmari)

→ *Tiun staĝon organizas niaj samideanoj de Metz. La aliĝilon vi sendu al la sidejo de la klubo kiel indikite... sed la staĝo okazos en Moulins-lès-Metz, kien ni veturos rekte la sabaton post-tagmeze.*

## programo

SABATON, la 25an de junio

13a/14a30: alveno kaj akcepto de la partoprenantoj
15a00: la kurs-sekvenco (ĉiu daùras 45 minutojn - 15 minutojn paùzo)
18a45: libro-servo. Amika interbabilado
19a15: komuna vespermanĝo en la MJC
21a00 kultura spektaklo

---

* bonvolu krucumi en la elektita kvadrato

*(bonvolu detranĉi aù kopii)*

**ALIĜILO AL LA 17 a STAĜO**

**urĝega**

S-ro☐ S-ino☐

Nombro de personoj:

NOMO: Antaùnomo:

Nomo kaj antaùnomo de la akompanantaj personoj:

ADRESO:

Tago kaj horo de alveno: trajne☐ aùtomobile☐

Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun lito(j) sabate vespere (*ĉambroj estas 1- aù 2-litaj*).

Mi rezervas manĝojn: sabate vespere por personoj, dimanĉe tagmeze por persono(j).

Mi partoprenos en kurso A1☐ A2☐ B☐ C☐ D☐

*(eventuale)* Mi deziras trapasi ekzamenon *"atesto pri lernado"* ☐
*"atesto pri praktika lernado"* ☐
*"atesto pri kapableco" (skriba)* ☐

*Ĉu vi estas abonanto de "La Informilo"?*
*jes* ☐ *ne* ☐

bonvolu turni →

DIMANĈON, la 26an de junio 1983

8a : matenmanĝo
8a30: kurso (samritme kiel la sabaton)

11a45: libro-servo - amikecaj babiladoj - forveturo por la "Kultur-Domo", 36, rue St-Marcel, METZ
13a00: komuna tagmanĝo en la bela kadro de la Kultur-Domo.

*Post la tagmanĝo estos ebleco... viziti muzeon aŭ la katedralon.*
*Komitatanoj havos iom da laboro: ili estas petataj ne tro frue forveturi!*

## RESTADO-KOSTOJ

ALIĜO: 43F po persono
25F por la abonantoj de "LA INFORMILO" kaj por iliaj familianoj. 15F por gejunuloj 12/18 jaraj
Senpaga aliĝo por infanoj sub 12 jaroj.

ĈAMBRO KUN MATENMANĜO: 49F
30F por gejunuloj 12/20 jaraj
26F por infanoj sub 12 jaroj

VESPERMANĜO (la sabaton) 35F (sen trinkaĵo), 22F (12/20 jaraĝuloj), 17F (sub 12j.)

TAGMANĜO (la dimanĉon) 45F (ĉio enkalkulita), 35F (12/18 jaraĝuloj, 20F sub 12 j.)

## LIBRO-SERVO

*Ĉiu Esperantisto devus aĉeti almenaŭ unu libron pojare!*

*Se vi deziras havigi al vi librojn sen sendo-kostoj, bonvolu mendi ilin antaŭ la staĝo! Vi ĝoje malkovros ilin tuj post via alveno en Metz.*

*Por la kurso D, la legado de la verko de "Maŝinmondo" (Szathmari) estas konsilinda antaŭ la staĝo: la libron vi ricevos post ricevo de ties mendo.*

*Bonvolu mendi la dezirataj librojn al:* LIBRO-SERVO, BP 23, 54510 TOMBLAINE
*(Ne kunsendu monon: fakturo ĉiam akompanas la librojn en la pakaĵo)*

Bonvolu sendi kiel eble plej frue la ĉi-suban aliĝilon kun antaŭpago de 30F po persono, nepre antaŭ la 11an de junio. al adreso ĉi-dekstre. Banko-ĉeko je la nomo de CLUB D'E° de METZ; Poŝt-ĉeko je la nomo de Madeleine DE ZILAH CCP 2620 33 W NANCY

➡ CLUB D'ESPERANTO DE METZ
Maison de la Culture
et des Loisirs
36, rue St-Marcel, 57000 METZ

---

*Mi antaŭmendas la jenajn verkojn:*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| *= por la kursoj A1 kaj A2 :* | "JUNULKURSO" | 25F | *necesa* | ☐ |
| *= por la kurso B:* | "ASTERIKS LA GAŬLO" | 30F | *helpema* | ☐ |
| *= por la kurso C:* | "NORMANDAJ RAKONTOJ" (Maupassant) | 26F | *helpema* | ☐ |
| *= por la kurso D:* | "MAŜINMONDO" (Szathmari) | 36F | *necesa (sendkosto estas enkalkulita)* | ☐ |

*Mi kunmetas banko-ĉekon* ☐ *poŝt-ĉekon* ☐ *je F*
*(antaŭpago: 30F po persono + 36F por kursano "D")*
*+ 25F por kursanoj A1 A2.*

*Dato:*

*Subskribo:*

*Estimataj Federacianoj!*

*La unuaj deklaroj de la novelektita prezidanto estu dankvortoj al la prezidinto, Pol Denis, pro lia laboro. Sufiĉe bone ni lin konas, por scii, ke li sendube plulaboros kun ni. Krome li daŭre reprezentos la federacion kiel vicprezidanto. La saman postenon akceptis alia laboremulo: sinjoro Colnot. Kredu min, gesamideanoj, tio kuraĝigas freŝbakitan prezidanton!*

*Vi ja scias, ke nia federacio estas reprezentata en la komitato kaj la estraro de U.F.E., kiu agas kadre de U.E.A.- Ke ni subtenos la politikon de niaj nacia kaj internacia asocioj do ne mirigos vin; sed samtempe la Orient-franca Esperanto-federacio ĉiam estis akceptostrukturo por ĉiuj ajn esperantistoj de la regiono, kaj tiongi devas resti. Veraj geamikoj restas geamikoj malgraŭ malsameco de ideoj. Ni estu fidelaj al tiu sinteno!*

*Pri la eblaj rezultoj de nia agado mi deziras resti modesta. Pro tio mi fiksas al vi celon facile atingeblan: ĉiu inter ni provu -ĉiujare- aliĝigi almenaŭ unu personon al nia perkoresponda kurso aŭ al la federacio. Vi ja povos kontroli mem, ĉu vi plenumis tiun taskon!*

*Jam nun mi dankas pro via helpo.*

Edmond LUDWIG

# Ni bone kongresis !

La 42a kongreso de la Orientfranca Esperanto-Federacio arigis, la 23an kaj 24an de aprilo 1983, en Luksemburgo, kvindekon da partoprenantoj. Por la unua fojo, la kongreso okazis en Luksemburgo, dank' al la invito de la tiea Esperanto-Asocio. Gi disvolviĝis glate en la Eùropa Domo kaj donis grandan sukceson dank' al la klopodoj de Claude NOURMONT kaj de Brian MOON. Inter niaj eksterlandaj samideanoj troviĝisGermanoj, Belgoj, Nederlandanoj.

La kongreso vigle komenciĝis per la raportoj el la diversaj urboj, kie agadas samideanoj: METZ (57), MONTIGNY-lès-METZ, STRASBOURG (67), PONT-St-VINCENT (54), SELESTAT (67), MUNSTER (68), BAR-le-DUC (55), NANCY(54). Estas notinda la granda laboro, kiun faras en METZ niaj samideanoj DE ZILAH kaj ankaù S-ino NAU, kiu ĵus sukcesis ekfunkciigi kurson en la libera radio "Radio-Graoully-Metz". En BAR-le-DUC menciindas la sukcesa karnavalo, dank' al la laboro de la gejunuloj, ni citu interalie Anne AMBLES. Kursoj funkcias en la liceoj de Selestat kaj MUNSTER kiel en elementa lernejo en PONT-SAINT VINCENT. En NANCY, krom la kutimaj kursoj en Junuldomo, okazas kurso por komencantoj en la beletra fakultato, gvidata de Denis KURT. La klubo de Nancio kunvenas ĉiun monaton, sed ĝia sukceso ne estas konstanta; en STRASBOURG, la klubo havas novan Prezidanton, Bertrand WICK.

La rezultoj de la diversaj voĉdonadoj estos menciitaj aparte. La agad- kaj kasraportoj estis unuanime adoptitaj. EStis decidita altigo de la prezo de la abono al "LA INFORMILO", kaùzita de malgranda deficito. La nova prezo estos 19 frankoj.

La sabata bufedo kunigis la tutan kongresanaron en la "kelo" de la Eùropa Domo. Tiu bongusta bufedo estis preparita de niaj luksemburgaj amikoj. Poste ĉiuj ĝuis la kulturan vesperon. Estis prezentita filmo pri Luksemburgio kun la partopreno de Brian MOON, kaj lokaj esperantistaj ratistoj interpretis kantojn kaj poemojn. Poste sekvis vingustumado; gratulojn al ĉiuj respondeculoj de tiu vespero!

Dimanĉe matene la novelektita prezidanto de la Federacio, Edmond LUDWIG, prezentas la laborplanon por la venonta jaro:

= La taskoj de ĉiu estrarano estas precize difinitaj. E. LUDWIG gratulas la antaùan prezidanton, Pol DENIS, por la senlaca laboro, kiun li faris, sed tamen lia tasko ne estas finita, ĉar li ankoraù prizorgas la redaktadon de LA INFORMILO. Gratulojn ankaù al Jean-Paul COLNOT por la impona laboro farita por la disvolviĝo de la perkoresponda kurso. La Libro-Servo bone funkcias dank' al roger DEGRELLE: ĉirkaù 1000 libroj estis venditaj lastjare.

.../...

= sekvis prezentado de la nova informkampanjo de U.F.E.: "SEL+IN" (SELekte INformi). Tiu kampanjo celas informi pri esperanto ĉiujn diversajn kulturajn asociojn, kiuj havas rilatojn kun eksterlando. La materialo de la kampanjo estos preta post du monatoj. La prezidanto respondas al ĉiuj demandoj kaj lanĉas alvokon al ĉiu federaciano, por ke tiu kampanjo sukcesu.

= Intensa uzado de la tute reaktualigita "vojaĝ-ekspozicio": dank' al la laboro de Pol DENIS, la materialo estas tute renovigita; ĝi estos je la dispono de ĉiu federaciano ekde septembro.

= daŭrigo de la inform-laboro fare de la Akademi-Inspektoroj.

= daŭra reklamado ĉe la studentoj pri esperanto kaj pri la perkoresponda kurso.

= plua organizado de staĝoj: la informkampanjo povas ebligi la organizadon de staĝoj por komnecantoj ĉe la asocioj. *(LASTMINUTO INFORMO: "Metodo 10" estas preta. UFE disponigos ilustritajn kajerojn por la staĝontoj je 25 F kaj gvidfoliaron por la staĝestroj je 5 F.)*

= alvoko al ĉiuj, varbu almenaŭ UNU novan esperantiston kaj federacianon dum la jaro.

La proponita agadprogramo ŝajnas ampleksa. Sed, se ĉiuj partoprenas ĝin vigle, ĝi povas esti sukcesa. Ni devas montri al la ekstera publiko, ke ni ja ekzistas....

Kaj ne forgesu: VARBU ALMENAŬ UNU...

Catherine ROUX

## KIEL VOĈDONIS LA KONGRESANOJ EN LUKSEMBURGO?

AGADRAPORTO: unuanime adoptita.
FINANCA RAPORTO: unuanime adoptita.

ELEKTO DE LA KOMITATANOJ: ĉar la nombro de la kandidatoj korespondis al la nombro de la liberaj lokoj, kaj ĉar neniu deziris sekretan voĉdonadon, estas unuanime elektitaj:

- Anne AMBLÈS, Pol DENIS, Madeleine DE ZILAH, Jean-Luc THIBIAS, Bernard VIVIER, Bertrand WICK

... jen do la reaktualigita listo de la komitatanoj de nia Federacio por la venonta jaro:

### KOMITATO DE ORIENTFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

### COMITÉ DE LA FÉDÉRATION FRANCE-EST POUR L'E°

******************

| | | |
|---|---|---|
| AMBLÈS ANNE | 11, rue des Ducs | 55000 BAR-le-DUC |
| COLNOT JEAN-PAUL | 15, rue de Lavaux | 54520 LAXOU |
| DAUTREVILLE PHILIPPE | 3, rue des Narcisses | 68400 RIEDISHEIM |
| DEGRELLE ROGER | BP 23 | 54520 TOMBLAINE |
| DENIS POL | 5, chemin de Blamecourt | 55000 BAR-le-DUC |
| DE ZILAH MADELEINE | 39, rue Joseph Hénot | 57070 METZ |
| GROSSMANN ANDRÉ | 5, rue des Pyrénées | 68390 BALDERSHIEM |
| GUILLAUME RENÉ | Ecole Pasteur | 54550 PONT-ST-VINCENT |
| LUDWIG EDMOND | 46, route de la Schlucht STOSSWIHR | 68140 MUNSTER |
| ROUX CATHERINE | 9, square Aristide Briand | 54500 VANDOEUVRE |
| SCHEFFER YVES | 96, rue de la Colline App.5333<br>6,rue Leussiote | 54000 NANCY<br>57000 METZ-MAGNY |

.../...

| | | |
|---|---|---|
| THIBIAS JEAN-LUC | 37, rue Pierre Curie | 54500 VANDOEUVRE |
| VIVIER BERNARD | 204, rue de Ravenne | 54240 JOEUF |
| WICK BERTRAND | 2, rue du Loess | 67200 STRASBOURG |

LA NOVA ESTRARO PREZENTIĜAS JENE:

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Edmond LUDWIG |
| Unua vic-prezidanto: | Jean-Paul COLNOT |
| Dua vic-prezidanto: | Pol DENIS |
| Sekretario: | Catherine ROUX |
| Kasisto: | André GROSSMANN |
| Redaktoro de "L.I°": | Pol DENIS |
| Eksteraj rilatoj: | Jean-Paul COLNOT |
| Junular-delegito: | Philippe DAUTREVILLE |
| Libro-servo: | Roger DEGRELLE |

KOMITATO DE U.F.E.

MEMBRES DU CONSEIL D'ADMINISTRATION DE L'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO (U.F.E.)

**************

| | | | |
|---|---|---|---|
| | BOULET Jean-Pierre | Bt A, La Boutiquerie, Av. Joffre | 63800 COURNON |
| | BOUROT Suzanne | 15, rue Morel-Payen | 10000 TROYES |
| V.-PR. | CHICOT Emmanuel | 40, square des Marroniers | 78870 BAILLY |
| | DEBERTONNE André | 9, rue du Vieux Versailles | 78000 VERSAILLES |
| | DENIS Pol | 5, chemin de Blamecourt | 55000 BAR-le-DUC |
| | DESPINEY Dominique | 13, rue Jean Beaussire | 75004 PARIS |
| | DESPINEY Roger | 43, quai de Champagne | 94170 LE PERREUX |
| | GONIN Hervé | 9, rue de l'Enclos | 59151 ARLEUX |
| | GUILLAUME Jean | De Grasse Village n° 66 | 78810 FEUCHEROLLES |
| | HENIN JEan | Beauregard, route de Montcayroux | 48500 LA CANOURGUE |
| | HENRY Hugues | 9, cité Rochebrune | 91220 BRETIGNY |
| | LEGER Bernard | 35, rue Victor Mussault | 94120 FONTENAY |
| | LE MAGADURE Frédéric | 23, rue Jules Ferry | 56700 HENNEBONT |
| | LE PUIL Jacques | 5, place Lavoisier (61) | 93380 PIERREFITTE |
| | LIOUVILLE Marie-Thérèse | 9, rue Clodion | 75015 PARIS |
| | LUDWIG EDmond | 46, route de la Schlucht STOSSWIHR | 68140 MUNSTER |
| | MORIN Paul | 21, rue Moyenne | 18000 BOURGES |
| | NOURMONT Claude | 3, rue Kleppchen | L-DALHEIM |
| TRES. | ROUSSEAU Jack-André | 64, avenue Jean Moulin | 75014 PARIS |
| PRES. | TEXIER Jean-Louis | chemin des Carreaux, CERNY | 91590 LA FERTE ALAIS |
| SECR. | TRIOLLE Renée | Bello Bauco, chemin de la civade verde | 13600 LA CIOTAT |
| | VIERNE Yvette | 5, rue Docteur Roux | 34500 MONTPELLIER |
| | VINCENT Jeannine | 26, rue de Milngavie | 49150 BAUGE |
| | DANVY Jean-Pierre | 5, rue Maurice Loewy | 75014 PARIS |

(substrekitaj la estraranoj)




Kiel promesite en la pasinta N°, jen prezento de TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO..."TEJO"
Sed antaùe, ĉar prokSimiĝas la somero, legu pri kelkaj eblecoj junulare kaj internacie ferii.

LA PLEJ MALMULTEKOSTA

En Bavario (F.R.Germanio), por 70/80 germanaj markoj (NUR!) vi ĝuos tutan semajnon en arbara, montetara, komforta domego. La prezo inkluzivas restadon (loĝadon + manĝon) kaj ĉiujn programerojn, inter-alie ekskurson. Gejunuloj sub 26 jaroj ricevos cetere vojaĝ-subvencion.
Ĉiuj ĝuos plej amikan etoson!

---

3-a franc-germana junulara seminario en Altusried ĉe Kempten

15-a ĝis 22-a julio 1983






temo:
**Burĝa Ĉiutago**

**radikalaj revoj**

-senaŭtoritata edukado
-alternativaj projektoj
-virina universitato en Berlino
-memadministrataj entreprenoj/kundecidado
-konkretaj utopioj de virinoj kaj viroj
-pli da libertempo-pli da libereco

loko: Altusried situas en la antaŭalpa regiono en la proksimeco de Kempten.Ni loĝos en renovigita bieno. En la programo kompreneble estos ekskurso al la Alpoj.

Bonvolu sendi al:
Elisabeth Kuhl-Kruse
Mathildenstr.73
D-2800 Bremen 1

Mi venas al Altusried

NOMO.....................

naskiĝdato........sekso.....

adreso...................

dato......... subskribo..............

kostoj:

| DM | aliĝo ĝis 1.6.83 | poste |
|---|---|---|
| ĝis 25-jara | 70.- | 80.- |
| pli ol 25-jara | 80.- | 90.- |

Bonvolu antaŭpagi 50.- DM al:
Poŝtĉekkonto Karlsruhe 545 77-754
Germana Esperanto-Junularo, Pf. 10 14 22,
D-2000 Hamburg 1

La antaŭpagon minus 10.- DM vi nur rericevas, se vi malaliĝas ĝis la 17-a de junio 1983.

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO DEBRECEN 1983

1983

# 39a Internacia Junulara Kongreso de TEJO 23-30. de julio 1983 Debrecen - Hungario

... LA PLEJ GRAVA E°-JUNULARA ARANĜO ĈI-JARE PRI LA TEMO INFORMFLUO EN LA NUNTEMPA MONDO.

Aliĝilon petu de la redaktoro de LA INFORMILO.

Rapidu: Post la 10a de junio, la prezoj altiĝos je 40/50 NL-guldenoj!

ĈU VI ESTAS BICIKLEMA? Internacia karavano biciklos de PASSAU (RFA), ĉe la german-aùstra limo al DEBRECEN (plej oriente en Hungario), de la 11a ĝis la 23a de julio. La etapoj estos mezume 50/70 km-aj.

... Informiĝu kaj aliĝu ĉe Anne AMBLES, 11 rue des Ducs,
F-55000 BAR-le-DUC



# La Diferenco: kial tejo?



# ne nur por gejunuloj...

Eble vi demandas vin, kio estas la diferenco inter la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kaj ĉiu alia internacia organizo, kiu kunligas plurajn naciajn organizojn. Kial ne sufiĉas via aktiveco en la loka grupo, kaj kion pli povas TEJO doni al vi?

La respondo estas: MULTON! Tie kuŝas la diferenco: TEJO ne nur kunligas plurajn landajn sekciojn, ĝi estas io esence alia: TEJO estas por la junularo tio kio UEA estas por la ĝenerala movado: LA KERNO. Pere de ĝi kuniĝas multaj apartaj fortoj al unu kohera potencialo: Esti Individua membro de TEJO signifas troviĝi ĉe la centro de la internacia junulara movado.

TEJO donas al vi servojn en granda nombro kaj varieco: Pasporta Servo de TEJO – la unika rimedo por malaltkoste vojaĝi kaj samtempe konatiĝi kun personoj kaj tradicioj senpere de vojaĝagentejoj kaj de hoteloj. Vi trovos senpagan gastigadon en dekoj da landoj kaj en duonmilo da adresoj en la tuta mondo. Kial ne mem fariĝi gastiganto? Se vi rapidos, vi povos enskribiĝi ankoraŭ por 1983

La kunvenoj de TEJO jam estas konataj en la tuta Esperanto-movado. Se vi unufoje partoprenos ekzemple la Internacian Junularan Kongreson de TEJO – vi aspiros denove partopreni ĝin ĉiun jaron: tiuj kunvenoj havas internacian amikan etoson kiel vi verŝajne nenie alie povos trovi, en kaj ekster la Esperanto-movado. Individua Membro de TEJO ĝuas signifan rabaton por la aliĝkotizo!

Inter la eldonaĵoj de TEJO elstaras *Kontakto* – unu el la plej bonaj Esperanto-periodaĵoj, lingve kaj enhave. Provu, indas ja! Legu apude pri la transformo ĉe *Kontakto*. Ekde 1983 ĝi aperos ne 4-foje sed 6-foje jare – tamen la abonkotizo en guldenoj restas senŝanĝa! Krome, TEJO tenas la kontakton kun siaj membroj per pluraj aliaj eldonaĵoj: *Koncize* informas pri tio, kio okazas en la junulara Esperanto-movado, nacie (ĉefe en Okcidenta Eŭropo) kaj internacie, la nova *TEJO tutmonde* – informilo pri TEJO kaj la junularo en la tuta mondo, "TEJO-paĝo", la heroldo de TEJO al la ĝenerala movado, regule aperas en la revuo *Esperanto*.

Kaj fine – TEJO estas la saltejo al la Internacia Esperanto-socio. Vi rapide malkovros ke vi havas multajn geamikojn en la tuta mondo. Vi apartenos al tre varia internacia rondo, kiu tamen restas malfermita al la ekstera mondo – kontaktas kun ne-Esperantaj junularaj organizoj, kaj serioze kunlaboras en internaciaj kadroj (kiel la junulara centro de la Eŭropa Konsilio, Unesko kaj aliaj).

Eĉ se vi estas pli ol 26 jaraĝa... ne forĵetu tiun ĉi folion! TEJO ne celas nur gejunulojn.

TEJO celas la estontecon de la movado: ĝi kreas daŭran fluon de junaj kaj aktivaj esperantistoj, kiu garantias la generacian sinsekvon. Sed la ligon inter la generacioj ni devas flegi ambaŭdirekte: ankaŭ VI estu informata pri la tendencoj kaj pensmaniero de la nuntempa junularo, pri la problemoj kaj defioj kiujn frontas junaj esperantistoj – kaj tiam vi povos helpi al la junulara movado.

Fariĝu PATRONO de TEJO – ne nur por finance helpi al la organizo, sed por fariĝi parto de ĝi. Por helpi morale, por pli bone informiĝi kaj kompreni la junularon de hodiaŭ kaj de morgaŭ.

Kiel Patrono de TEJO vi

– ricevos la unikan revuon *Kontakto*, 6-foje jare. Jes, ĝi estas gazeto de la junularo. Jes, ĝi estos adaptita al la bezonoj de novaj esperantistoj. Sed ĝi restas bonkvalita kaj leginda gazeto por personoj el ĉiuj aĝ-grupoj, por movadaj novuloj kaj veteranoj,

– ricevos regulan novaĵ-bultenon de TEJO, kaj ne-regulajn publikaĵojn,

– helpos krei sanan fundamenton por la Esperanto-movado de morgaŭ, estante Patrono de TEJO hodiaŭ.

Vi povas helpi pli: diskonigu la aferon! Rakontu pri TEJO, Pasporta Servo kaj ĝiaj aliaj avantaĝoj kaj celoj al viaj junaj kaj ne junaj samideanoj. Aktiviĝu!



Amri Wandel
prezidanto de TEJO

## NOTRE COURS PAR CORRESPONDANCE

Depuis septembre nous avons envoyé à la presse régionale 78 communiqués concernant notre cours; au moins 30 d'entre eux ont été insérés. Nous avons reçu plus de 100 demandes de renseignements et inscrit 33 élèves. Un nouvel élève atteint la fin du cours: Mme LAGNY, 55140 Burey-en-vaux, dirigée par P. Denis. Les autres élèves continuent leur étude de la langue internationale; nous pourrons certainement annoncer d'autres succès dans le prochain n° de LA INFORMILO.

## NIA VIVO EN... NANCY

Niaj diversaj kursoj daŭre funkcias: en la Beletra Fakultato por la komencantoj; en la junuldomo Ph. Desforges la 2a-grada kaj la 3a-grada kursoj kaj ankaŭ la kunvenoj. Dum la kunvenoj de la 6a de majo kaj de la 3a de junio, ni jam pristudos la organizadon de la venonta laborjaro. Kiuj deziras gvidi parolajn kursojn? Kiuj prezentos programon por la programo de niaj estontaj kunvenoj? se ni obeos la agadplanon proponitan de U.F.E., kiujn asociojn ni kontaktos por proponi al ili Esperanton?
Alia demando: ĉu okazos denove aŭtuna staĝo en NANCY? La Junuldomo Ph.D. suferas grandegan financan deficiton pro sia "Junular-hejmo", tio estas la 7-etaĝa domego, en kiu situas la ĉambroj kaj preskaŭ ĉiuj salonoj, kiujn ni uzis dum niaj staĝoj. la ĉambroj estas tro ofte ne-luitaj. Oni parolas pri fermo de tiu hejmo. Eble la urbestraro de NANCY decidos mem administri ĝin? Tiukaze, ni ne plu disponos pri ĉambroj por staĝoj nek pri kurs-salonoj -aŭ ni devos pagi multe pli ol ĝis nun- Ni studas nun aliajn belecojn.

***

Tre kore dankon al la 20 personoj en 9 departementoj, kiuj regule sendis al mi la komunikojn, kiujn ili trovis en sia loka gazeto! Per ili mi povis ĉi-jare plenigi ĝis nun 13 paĝojn laŭ formato 21x29 per 70 komunikoj aŭ artikoloj. (Lastjare 26 paĝoj per 112 koloj, antaŭ 2 jaroj 34 paĝoj per 149 ratikoloj).

*************

J.P. COLNOT

---

## LA ESPERANTO-MUZEO DE GRAY (Hte-Saône) NEPRE VIZINTINDA!

Post partopreno en la UFE-Kongreso en Romans mi decidis hejmenveturi tra GRAY por viziti la nacian E°-muezon. Inter la vidindaĵoj anoncataj enireje de la urbo sur apudvoja panelo salutis min granda verda stelo. "Bona aŭguro" mi pensis... Prave! Veran trezoron amasigis la kuratoro, samideano JUNIER. Per sia laborego li sukcesis veki la intereson de la urba konsilantaro, kiu nuntempe renovigas la tutan ejon, aŭ pli ĝuste la tutan ejaron: 9 ĉambroj!, t.e. la unua etaĝo de iama mezlernejo... Fine de 1983 ĉio estos preta por inde akcepti, informi kaj tre certe mirigi vizitantaron tutmondan.
Ĉe "Syndicat d'Initiative", 8, rue V. Hugo, 70100 GRAY vi petu la turisman prospekton. La oficejo korespondas en esperanto. Skribigu viajn diverslandajn geamikojn!
sinjoro JUNIER certe ankaŭ bonvole akceptas rarajn dokumentojn, kiuj dormas en tirkesto via!

****

E. Ludwig

## Bibliografia noto

*"Por multoble pli-vastigi nian movadon, ni ĉiam uzu nur Esperanton tre facile kompreneblan!"*
Verkinto: Albert LIENHARDT (1904-     ), aŭtoro de *Amuzaj dialogoj en esperanto, facilaj dialogoj en esperanto* k.a. - Eldonis: Ligue Française "Pro UNESCO", 24, Av. de Riedisheim, F-68100 MULHOUSE. - 1982. - 3 + 64 paĝoj - 21 cm. - Prezo: 18 FF (plus afranko: 4F)

Rezulto de la spertoj akiritaj far la aŭtoro dum lia pli ol 50-jara aktiveco kiel gvidanto de kursoj, kontrolanto de manuskriptoj kaj verkanto de libroj kaj de nombro da artikoloj.

ENHAVO: 1/ Prefaco.- 2/ Didaktika literaturo en E° simpla kaj facile komprenebla.6 3/ E° ne estu "simpligita" sed uzata simpla-maniere!- 4/ Kia-maniere klarigi al la E°-lernantoj la kompleksajn vortojn.- 5/ Kia-maniere prononci la kompleksajn vortojn en E°.- 6/ Utileco kaj uzado de la verboj "iĝi" kaj "igi".- 7/ Pri la uzo kaj mis-uzo de afiksoj en E°.- 8/ Pri la didaktika valoro de E°-proverboj.- 9/ Kritikaj konsideroj pri la poezio en E°.- 10/ Pri la uzado de interpunkciaj signoj en E°.- 11/ Kie meti limon al "esperantigo" de latin-literaj nomoj.- 12/ Apliko de la mediala voĉo por klarigi la uzon de la pasivaj participoj en E°.- 13/ Ni evitu uzi verbojn derivitajn el participoj en E°.- 14/ Pri la prefiksa uzo de "kun", "kune" kaj "kunen".- 17/ Vortoj kunen-metitaj kaj apud-metitaj en E°.- 16/ Pri la uzado de "Tio, kio...", "Tia, kia..." kaj similaj esprimoj.- 17/ Rimedo por faciligi la lernadon de la akuzativo en E°.- 18/ Konversacio pri bildoj... por lerni paroli en E°.

Komplemente: 2 rilataj magnetofonaj kasetoj LG/n°4.1 kaj n°4.2 - Prezo: 29FF (plus afranko: 4F) Mendebla ĉe S-r° Grossmann, 5, rue des Pyrénées, F-68390 BALDERSHEIM (Francio).
Bonvolu antaŭ-pagi.

G. Kirtz-Boeglin
Dum-viva membro de UEA kaj UFE

# ...partoprenu...

| | | |
|---|---|---|
| 25/26 - 6 - 1983 | 17a staĝo de "parolata esperanto"<br>Ermitage de Moulins-lès-Metz | CLUB D'ESPERANTO DE METZ<br>36, rue St-Marcel<br>57000 METZ |
| 2/22 - 7 | "Prelegoj kaj kursoj" - ekskursoj<br>Internacia ĉeestantaro. | ESPERANTO-DOMO."GRESILLON"<br>49150 BAUGÉ (F) |
| 15/22 - 7 | 3a franc-germana junulara seminario<br>D-Altusried ĉe Kempten | aliĝilo en ĉi-tiu INFORMILO<br>(paĝo de la junularo) |
| 22/25 - 7 | Dua "Loire" Esperanto-Rendevuo<br>organizita de L.-F.-KOOP. | ESPERANTO-DOMO<br>(vidu supre) |
| 25-6... 2-7... | INTERNACIA ESPERANTO-VOJAĜSEMAJNO<br>Suda Francio - Lazura marbordo! | Informoj ĉe: **R. Llorens, "Hortensias", 121 bis blvd. Napoléon III, F-06200 Nice.** |
| 23/30 - 7 | 39a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO<br>H-DEBRECEN (Hungario) | aliĝilo apud la redaktoro<br>de LA INFORMILO. |
| 30-7... 6-8 | 68a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO<br>H-BUDAPEST | peras: UFE, 4bis, rue de<br>la Cerisaie, 75004 PARIS |
| 30-7... 5-8... | 56a- KONGRESO DE S.A.T.<br>A-LINZ Aŭstrio | OKK: Max Hollinger<br>Gruberstr.65, A-4020 LINZ |
| 25-7... 7-8... | "Kursoj kaj Ekskursoj"<br>Internacia ĉeestantaro. | ESPERANTO-DOMO<br>(vidu supre) |
| 8/21 - 8 | "Artmetioj kaj esperanto"<br>Tre riĉa programo! | ESPERANTO-DOMO<br>(vidu supre) |
| 22-8... 3-9... | RENKONTO DE BLINDULOJ<br>(organizita de F.U.B.E.) - ankaŭ<br>malfermata al vidpovantoj. | ESPERANTO-DOMO<br>(vidu supre) |
| 4/11 - 9 | Internacia renkonto (Natur-Amikoj)<br>Kultura kaj Feriocentro APPENBERG<br>Tre riĉa programo! | T.A.N.E.F. Erna Döring<br>P.F. 225, CH-4003 BASEL |
| 11/18 - 9 | Por la 6a fojo!... ESPERANTISTA SEMAJNO<br>apud strando lazurmarborda!<br>tre riĉa programo! | CENTRE CULTUREL ESPERANTO<br>C.I.J. - Rue de la petite<br>Corraterie-34000 MONTPELLIER |
| 1 - 10 | Granda Festivalo de Magio kun TRIXINI!<br>Nepre ĉeestinda! (speciala anonco en<br>ĉi-tiu n°) | F-BALDENHEIM<br>67600-SELESTAT |

***************

__KAJ NOTU ANKAŬ...__ ĉiusemajne, konstanta E°-kleriĝo en CH-LA CHAUX-de-FONDS

ifa internacia feria alternejo

Dum la tuta 1983 Kultura Centro Esperantista, en La Chaux-de-Fonds, organizos Esperanto-staĝojn, por komencantoj kaj progresantoj.

La staĝoj daŭras po unu semajno, kun instruado matene kaj feriado posttagmeze. Gvidas la staĝojn Stefano Keller.

Datoj por komencantoj: aprilo 5/10, majo 10/15, julio 17/22, aŭgusto 7/12, aŭgusto 26/septembro 2, septembro 18/23, novembro 8/13.

Datoj por progresantoj: aprilo 19/24, junio 21/26, julio 24/29 kaj julio 31/aŭgusto 5, aŭgusto 14/19, 21/26, septembro 4/9, 11/16 kaj 25/30, oktobro 2/7, 25/30, novembro 22/27. En 1984: januaro 24/29.

KCE - CP 771 CH-2301 LA CHAUX-de-FONDS

***************

__Dumsomere...__ "Restarigo de malnovaj mueliloj"
aliĝilo apud: "Le Moulin des Apprentis" - 23220 BONNAT (F)



# distra angelo



## KRUCVORTENIGMO *



HORIZONTALE = 1 nedanĝeraj flamoj - maŝinkudri (R) 2 necesa al ĉiu turisto - koncernas aktoron (R). 3 akvoplanto - nemalhavebla - artiklo. 4 montrivero multaj perdiĝas!. 5 grandigas tablon - regula en E°. 6 kruda ŝtofo - ŝirmas naturamikon - en salato. 7 suferi pro nenionfarado - monunuo - akompanas viandon. 8 honorigilo - kiel teo en akvo. 9 nepu blika - origini en iu ajn epoko (R). 10 antaŭ la birdo - matematika esprimo - pez/ aŭ monunuo. 11 paro - translokiĝi malseke - kvazaŭa diveno de la futuro. 12 granda en operverko - stranga kelo - grasa frukto.

VERTIKALE = 1 taŭga momento - prepozicio. 2 birdo elstara ronda modluro (R). 3 difektita malpuraĵo - ŝatata de la infano. 4 kuraci per varmeco - ŝi naskis nian patron. 5 japanorigina ŝtofo - malfacile paŝanta. 6 kunfiksaĵo por metaloj - simbolo de malakordo - duonprestiĝo. 7 mamulo- maro (R). 8 speco de agato - akvomaso - nedifinita loko. 9 apartigeco - speco de musko. 10 per elektra veturilo - por ke ni aŭdu. 11 Dio de la ventoj - maljes - prenu kiel rimedon - maceri planton. 12 planto - besteto - en la centro de ĉiu movo.

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ ("LA INFORMILO" n° 41)

1/ KRUCVORTENIGMO: karnavalo - fad - amalgamo - celi - ŝpruc- kulio - te - klapo - uzu - mien - oero - loaro lo - koloida - nep - estraro - nikso - ro - op - lumig - sit - cerebelo - rok - opini - bedaŭre - dogan - loeso - ed - asidua - acida

SILABENIGMO: proverbo - "Post vetero malbela lumas suno plej bela!"

LA SEKRETO DE LA FRUKTOBREDISTO: mirtelo - martelo - kartelo - kastelo - pastelo - pasteĉo - pastaĉo - pastaĵo pistaĵo - pistako

## SILABENIGMO *

*Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. la 1a kaj 3a kolonoj, vertikale legataj, formas proverbon.*

a an ar bla d e eb eda eo ero fe ge ik in io is it j ki la lo lo me mo na no no o ok pe ra ra ra ro s sfe si to tu ul ur

| | |
|---|---|
| 1 . - . - - - | ĉefurbo |
| 2 . - . - - | sen ligo kun iu ajn religio |
| 3 . - . - - | dentmaterio |
| 4 . - . - - | monato |
| 5 . - . - - - - - | ofendaĵo kontraŭ diaĵo |
| 6 . - . - - - - - | necesa por vivi |
| 7 . - . - - - | ni ĝenerale ŝatas ĝin |
| 8 . - . - - - - | sen longa vivo |
| 9 . - . - | malofta |
| 10 . - . - - - - | tutaĵo de irotaj vojoj |
| 11 . - . - - - | arkitekto de la Labirinto |
| 12 . - . - - - | malŝatata besteto |
| 13 . - . - - - - | kor-kontrahiĝo |




*"Allo?.. Doktoro?.. Via akupunktura kuracado ne tro glate efikas!..."*

imprimé par l'AGENCE TECHNIQUE DES ASSOCIATIONS, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-le-DUC - Le rédacteur: Pol DENIS - le directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT - dépôt légal n° 245 - inscription à la CPPAP sous le n° 62887

CLUB d'ESPERANTO de METZ
Maison de la Culture
36, rue St-Marcel
57000 - METZ

Supplément à LA INFORMILO n° 42 - 2° tr. 83

# 17° STAGE PRATIQUE D'ESPERANTO PARLE

Une fois de plus nous organisons sous l'égide de la FEDERATION FRANCE-EST pour l'ESPERANTO un stage qui permet de commencer l'étude de l'espéranto ou de se perfectionner dans la langue internationale.

Nous invitons tous les espérantistes des régions et des pays voisins à notre stage qui aura lieu à l'ERMITAGE de MOULINS-lès-METZ, rue du Château, à 6 km du centre de Metz, les Samedi et Dimanche 25 et 26 juin 1983.

DES COURS A NIVEAUX MULTIPLES sont prévus :

- Cours A 1 : si vous n'avez aucune notion d'Espéranto.
- Cours A 2 : si vous êtes déjà à mi-chemin d'un cours élémentaire ou d'un cours par correspondance ou si vous avez participé au stage précédent.
- Cours B : si vous êtes parvenu au terme de votre apprentissage élémentaire, vous y apprendrez à parler simplement mais uniquement en Espéranto.
- Cours C : KROKODILADO MALPERMESATA.
- Cours D : PRI ESPERANTO-LITERATURO.

Il y a donc un menu spécial pour chaque catégorie et c'est pour cela que nous osons inviter tout le monde! Le nombre de lits est limité: respectez la date limite d'inscription si vous désirez loger à moindre frais et dans un cadre agréable.

PROGRAMME : SAMEDI 25 JUIN 1983

13 à 14h30 : Arrivée et accueil des participants.
15h : 1° cours (chaque cours dure 45 minutes - repos de 15 minutes)
18h45 : Service de librairie.
19h : Repas en commun à l'ERMITAGE.
21h : Soirée culturelle.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

A recopier ou à découper

INSCRIPTION AU 17° STAGE D'ESPERANTO PARLE

25-26 juin 1983 à MOULINS-lès-METZ

NOM .............................. PRENOM ..........................................

ADRESSE ..............................................................................

JOUR ET HEURE D'ARRIVEE .................... PAR TRAIN OU EN VOITURE ..........

COURS CHOISI A 1 A 2 B C D Entourer le cours choisi.

Je réserve ...... lit(s) en chambre(s) à 1 ou à 2 lit(s), entourer le chiffre choisi, pour la nuit du 25/26 juin.

Repas : Samedi soir ....... Dimanche midi .........

Je désire passer l'examen : Atesto pri lernado
Atesto pri praktika lernado
Atesto pri kapableco

Mettre un OUI où il faut

Êtes-vous abonné(E) à LA INFORMILO ?

T.S.V.P.

DIMANCHE 26 JUIN 1983

8h00 : Petit déjeuner.
8h30 : Reprise des cours selon le rythme de la veille.
11h45 : Service de librairie - Libroservo.
Conversations amicales - Amikecaj babiladoj.
Départ en voiture pour la Maison de la Culture, 36 rue St-Marcel, Metz.
13h00 : Repas en commun dans le beau cadre de la Maison de la Culture.
Après le repas visite du musée ou de la cathédrale.
Komitatanoj havos iom da laboro.

EXAMENS : Les élèves des cours B-C-D peuvent passer un examen. L'examen a lieu le dimanche matin.

## FRAIS DE PARTICIPATION

INSCRIPTION : 43 F par personne.
25 F pour les abonnés à la INFORMILO et les membres de leur famille.
15 F pour les jeunes de 12 à 18 ans. Gratuité pour les moins de 12 ans.

CHAMBRE ET PETIT DEJEUNER : 49 F
30 F pour les jeunes de 12 à 20 ans.
26 F pour les enfants de moins de 12 ans.

REPAS DU SAMEDI SOIR : 35 F sans boisson, 22 F de 12 à 20 ans, 17 F en-dessous de 12 ans.

REPAS DU DIMANCHE MIDI : 45 F tout compris, 35 F de 12 à 18 ans, 20 F " " "

## SERVICE DE LIBRAIRIE - LIBROSERVO

Tout Espérantiste devrait acheter au moins un livre par an : ĉiu Esperantisto devus aĉeti almenaŭ unu libron pojare !

Si vous désirez des livres sans payer les frais de port, veuillez passer commande avant le stage. Vos livres vous attendront et vous trouveront avec joie dès votre arrivée. Pour le COURS D, l'étude du livre MAŜINMONDO de Szathmari est conseillée avant le stage : envoi du livre dès réception de la commande.

Commander les livres à : LIBROSERVO, B.P. 23, 54510 TOMBLAINE. Vous recevrez votre commande avec la facture.

A bientôt - Ĝis revido.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LIVRES : Je commande les ouvrages suivants :

- Pour les cours A 1 et A 2 : JUNULKURSO 25 F indispensable
- Pour le cours B : ASTERIKS LA GAŬLO 30 F
- Pour les C : matériel conseillé sur place
- Pour les D : MAŜinmondo necesa, kun sendkostoj 36 F

Pour les familles et groupes indiquez à part les nom, prénom, adresse et éventuellement âge des participants. Envoyez votre adhésion accompagnée d'un acompte de 30 F par personne avant le 11 juin à : CLUB D'ESPERANTO DE METZ
Maison de la Culture et des Loisirs
36, rue St-Marcel
57000 METZ

Chèques bancaires à l'ordre de : Club d'Espéranto de Metz
Chèques postaux à l'ordre de : Madeleine de ZILAH 2620 33 W NANCY

N'utilisez aucun mode de paiement autre que ces deux-là s.v.p.